



Informoj:
Arto -- Literatura
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakelo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

EKSTERLANDAJ PAĜOJ

KVAR POEZIAĴOJ.

Dediĉitaj al Josefo Martinez.

INDIFERENTECO

La strato dronas en krepusko blua,
la trotuaroj je neĝkoto plenas,
kaj blankaj flokoj ĉion ĉirkaŭprenas
per movo monotona kaj enua.

Kaj homoj grizaj kun mien' senĝua
laŭ la glitigaj trotuaroj venas,
piedoj dum singarda paŝ' posttrenas
kun rezignemo laca kaj sembrua.

Sentiĝas piko akra en la kor':
ja same lace sin la pensoj movas
kaj en la cerbon sin malvigle ŝovas,

ho, traas tranĉe bruston nur dolor'
pro la sendezireco absoluta,
kaj pro la kor' indiferece muta.

MALBENITA HUMORO

Brilas la suno printempe, karese,
sed maltrankvilo boradas senĉese
per antaŭsento sennoma la koron,
kaj fortimigas la ĝojan humoron.

Sin koncentrigi la volo ne povas,
flanken ĝi ĉiun laboron ekŝovas.
Ho, ne scipovas eĉ sun' orradia
savi la koron de l' stat' apatia.

Tiu humoro timigas, ĉagrenas.
ĝin mi malamas, elkore malbenas,
ekironias pri ĝi senkompate,
kaj ekinsultas min mem plej malflate.

En Bialystok, naskiĝa urbo de D-ro Zamenhof, fondiĝis Komitato por starigi statuon, kiu ĉiamigos lian memoron.

Tiu ĉi Komitato kreis duspecaj kotizajoj; unua, malgranda, de 0'50 ptj., por ke ĉiuj esperantistoj povu kunhelpi tiun starigon, kaj alia dekoblo de la unua. Kiu elpagos tiun ĉi kotizajon estos enregistrita sur la ora libro de la monumento. Frateco ricevas la mondonajojn.

NOKTAJ PENSOJ

Ventego vipas arbojn junfoliajn,
sur la unuajn florojn pluvo gutas,
kaj pensojn vundajn kaj melankoliajn
la brua nokto en la koron ŝutas.

Neelportebla iĝas la angoro.
Ekblovoj ventaj koron krude skuas,
ĝi treme kuntiriĝas pro doloro
dum pluvolaroj frostaj teren fluas.

Torente fluas al la ter' printempa,
vekante pensojn plenajn je malgajo:
ke ĉio estas efemera, tempa,
ke je trompajoj eĉ abundas Majo.

Ke dum feliĉmomentoj eĉ ne ĉesas
embuski niaj korojn la tempestoj,
ke preterglite nur la ĝoj' karesas,
ke fluge pasas la feliĉo-festoj.

NIA KORO

Ĉu ni povas ekmalfermi nian koron,
liberigi niajn dubojn kaj doloron?
Malavare nian rozpetalan ĝojon
ŝuti ambaŭmane apud nian vojon?

Kaŭras en la homrigardoj moko pika
aŭ komprenosento falsa, artifika.
Ironi-fajreroj en okul' saltetas,
dum asertojn aŭtomate buŝ' ripetas.

Dormetadas indiferececo ŝtona
eĉ en la animo de l' amiko bona,
kaj la sentoj en la propra koro dronas,
kie frostofloroj brile ekburĝonas.

HILDA DRESEN.

La kaso de «Frateco» antaŭeniras, kiel oni povas vidi per tiu ĉi resumo: Bilanco en 31-12-932: Antaŭa ekzisto: 2.715,78; enspezoj: 15.873,69; elspezoj: 14.808,15; ekzisto por la jaro 1933: 3.781,32 pesetoj.

En la venonta monato majo, Frateco malfermos kursojn pri Esperanto. Fratecanoj! diskonigos tiun novajon ĉe viaj gekonatuloj.

HEZITO

(Daŭrigo)

INTERAKTA AMUZAĴO DE JOSEFO ORÓS

Plej kore dediĉita al la kara majstro
S-ro Inglada

(Resumo de la antaŭaj scenoj: F-ino Julia, tial ke ŝi ne amas sian fianĉon Ludoviko-n, penas atingi ke tiu-ĉi ĝeniĝu, kaj tial fini la amrilatojn. Ludoviko hodiaŭ alvenis iomete malfrue, sed por dorloti Julia-n, li donacis al ŝi kesteton da bombonoj, kiun ŝi eĉ ne estimas. Ludoviko invitas sian fianĉinon fari promenadon por kontentigi ŝin, sed Julia ne volas, pretekstante ke ŝiaj kapo kaj piedoj ŝin doloras. Fine, tiom da malestimojn faras Julia al Ludoviko ke la fianĉo, tre trankvile, ŝin adiaŭas. Unuamomente post la foriro de Ludoviko, Julia ekĝojas, ĉar ŝi sin trovas jam libera; sed poste, iom post iom, ŝi malgajiĝas kaj bedaŭras tion, kion ŝi faris, tial ke ŝi ja komprenas ke ŝi amas Ludoviko-n. Nune, Julia ploras je la foriro de Ludoviko. Karmen, ŝia patrino, faras kap-signaloj plendajn por la malfeliĉeco, kiun ŝia filino al si mem kaŭzas pro sia ŝanĝanta karaktero).

SCENO IV.^a KAJ LASTA

(Ludoviko aperas el post la plektajo. S-ino Karmen faras al li signojn por ke li eniru).

Ludoviko. (Ŝajne serioza). Mi venis repreni la kesteton de dolĉaĵoj; ĉar mi vidis ke ĝi ne plaĉas al vi, kaj ke vi estas tiel malafabla mi pensis, ke jam malpacinte kun mi, eble vi estus kapabla ĵeti ĝin. Mi ĝin portos al mia patrino.

Julia. (Ĵus aŭdinte la voĉon, rapide levas la kapon, forviŝas la larmojn kaj malhumile diras): Tiu avareco estas inda je vi!

Ludoviko. (Trankvile). Mi estimas malmulte vian opinion. Avareco vi nomas tion, kio, laŭ mia kredo, estas praktika saĝo. (Pene subpremante la ridon). Mi ne volas, ke mia lasta donaco kuŝu malŝatite sur tero.

Julia. (Kolere donas al li la kesteton). Prenu!

Ludoviko. Tre bone. Nun, adiaŭ. Ĝis kiam ni revidos nin. (Formarŝas).

Julia. Ludoviko!! (Tuj bedaŭrante ke ŝi lin vokis).

Ludoviko. (Revenante). Ĉu vi vokis?

Julia. Ne... (Ludoviko intencas foriri)... jes... (Skizante sur siaj lipoj plorgemon). Nu... mi... nur... volis peti de vi bombonon... ĉar mi ne ekmanĝis ilin... kaj...

Ludoviko. Ha, sed ĉu vi ne ĵetos ilin? (Emocie). Sed, malgraŭ ke ĝi estas mia, vi deziras la karamelojn?

Julia. (Humile). Jes...

Ludoviko. Prenu ĝin do. Prenu ĝin, Julia.

Julia. (Viŝas siajn okulojn kaj prenas ĝin). Dankon Ludoviko. (Eltiras unu bombonon el la kesteto kaj ĝin manĝas). Nun, portu la kesteton al via patrino je mia nomo.

Ludoviko. (Emociita). Dankon Julia!! Mi sendos ĝin al ŝi, ĉar mi... jam ne iras. Jam estas malfrue por la ekveturo kaj, plie, mi scias ke la afero estas negrava.

Julia. Tamen, iru vidi vian patrinon. Se mi povas ordoni, mi ordonas al vi: Iru en la vespera vagonaro.

Ludoviko. Ĉu vi volas ke ni promenu kaj ni diskutos tion?

Julia. Se vi obeos al mi, jes. (Ŝi ekstariĝas).

Ludoviko. (Moke). Sed ne. Pardonon. Jam mi ne rememoris ke viaj pieĉoj kaj via kapo doloras vin...

Julia. (Humile). Ĉu vi pardonas min?

Ludoviko. (Paside). Mi vin pardonas kaj amas pli ol antaŭe, ĉar el post tiuj arboj mi vidis ke vi ploras, kaj tiuj larmoj tute feliĉigis min, ĉar ili estas la plej sincera konfeso, ke vi amas min. Mi iros vidi mian patrinon, kaj al ŝi mi portos la bombonojn, kaj ĉion kion vi volos.

Julia. ...Donu al ŝi ankaŭ... kison... je mia flanko.

Ludoviko. De kiu, mi diros?

Julia. (Mallevante la kapon). Diru, ke ĝin sendas al ŝi... ŝia bofilino.

(Ambaŭ iras funden. S-ino Karmen ilin rigardas, feliĉe ridetante).

KURTENO FALAS

LA RAVITA VIOLONO

BL HBRACLIO PEREZ PLACER

I

Paŝtisto de Invernadeiro, alportis novajon dirante, ke en la montaro de San Mamede ekzistas multe da kapreoloj kaj aproj, kaj la fervoruloj de San Humberto organizis, entuziasme, ĉasadon kiel ĉiujare.

Ili starigis la tendaron; la neĝaj flokoj jam ne flirtflugas, kiel se per la nokta hejlado la anĝeletoj laciĝis elĵeti jasmenon; la malvarmo estis granda kaj la nokto, longa; kiam ili laciĝis paroli pri multaj aferoj, la interparolado refalis, kiel estas nature, pri ĉasaj aferoj.

Por rakonti fanfaronajojn, neniu kiel la militistoj kaj ĉasistoj.

Tiuj rakontas militokazaĵojn, al ili okazintajn, kaj se oni ilin kredas, ili estas ĉiuj Cidoj, kaj tiuj ĉi, ĉian aventuron kian neniu vidis.

Tial ne estus strange ridegi, aŭdante diri, kiel okazintaĵo, ke al iu restis la vergeto en pafilo, kaj ke li trapafis bandon da perdrikoj, aŭ mortigis sep lupojn per unu pafado aŭ vulpon per ŝtopileto.

Sed tiel, kiel ĉe la fanfaronaj militistoj ekzistas veraj kuraĝuloj, tiel ekzistas kredindaj ĉasistoj.

Tiel, kiam Pexerto, maljuna ĉasisto, pretigis sin por rakonti unu el multaj okazintaĵoj de li travivitajn, ĉiuj lasis la ŝercadojn kaj pretigis aŭdi lin kun la devigita atento.

D. Pexerto rakontis al ni tion, kion preskaŭ pli malpli, mi rakontos, tiel, kiel mi rememoros ĝin.

II

—Silentul... Ĉu vi aŭdas?... Oni dirus, ke proksime sonoras muziko...

—Ve! Mi pensas, ke vi sonĝas—diris al li la ĉas-kamaradoj—kiel vi volas, ke sonoru muziko tie, ĉe tiuj ĉi apartaĵoj?

Eble estas la blankaj kapreoloj—diris iu, ridante kaj rilatante la landan tradicion—kiuj reakiras ilian humanan naturecon, kaj venas bani sin en la montaj fontoj.

—Jes, nun vintre... certe, ke feinoj, kiel ili estas, ne elportas tiun temperaturon, kiu glaciigas la spiron sur la lipharoj.

—Do ŝajnas al mi...

—Sinjoro, la vino supreniris al lia kapo kaj ili ellasante ekridegon, atakis tre bongustan cervan kruron, kaptita tiun matenon en la montaro de San Mamede, kie ili starigis la tendaro.

Sed ili subite restis haltigitaj, kial ne diri ĝin?, timigitaj kaj mirigitaj.

Klare alvenis al iliaj oreloj la dolĉaj akordoj de violono, ludita kiel per ensorĉo.

Oni dirus, ke anĝelaj harpoj ludadis neniam aŭdeblan serenadon, ĉe mistero de reva nokto; ke la montaraj fontoj, rompante la kristalojn, trubis, kiel en printempo, kiam ili elglitis sub la foliaro, kaj, tamen, la muzikaĵoj estis konataj, eĉ iaj el ili estis vulgaraĵ.

Tio ne estas natura; tre malproksime de domaro, kun du metroj da neĝo, kiu estis la mistera muzikisto, kiu revigis per tiuj ravaj akordoj?

Kiu ne pensis pri kiaj diaĵoj aŭ feinoj elvekis, ĉe tiuj solecoj, eĥojn de ravaj harmonioj?

Kaj ili sentis tiun instinktan teruron, kiun produktas la nekonataĵo, en la sama momento, kiam ili revis aŭdante tiun dolĉegan muzikon, enpenetrigita de tiel milda melankolio, ke la larmoj penis por elsalti el la okuloj.

Iuj, regitaj de la scivolemo, pli granda ol la timo, elrampis inter la kanabtoloj de la tendaro, kaj ili vidis nur tre helan nokton, la ĉielon sennuban, disemitan per steloj kaj la lunon ilumini per arĝentaj lumradioj tiun blankan nokton: tiel blanka, ke eĉ la aero desegnus ombrojn.

Kaj la muziko ludadis, ĉu la tradician galican «mũiñeira» (danco ĉe muelejo), ludema, ĉu la dolĉegan tagiĝan muzikaĵon, ĉu la kadencan valson, kiel se ili invitus la flokojn flirtflugi kun la ventetoj.

Alifoje, sonoritis pecoj da operoj, kiuj kaŭzis strangan impreson en tiu montaro, kien nur alvenis la kantoj de pastistoj kaj la interjekcioj, de ĉasistoj kaj tiel baldaŭ oni aŭdis «Moraima», aŭ la arion de «Filinoj de Evo».

Kaj nenio, la soleco ĉie; la neĝo farante ĉielarkolorojn per la radioj de la luno, la blua malhela ĉielo, tra kiu kuradis la steloj, kiel animoj, kiuj serĉadas sin tra la senlima spaco.

Subite la violono ĉesis ludi, kaj humana voĉo, klara, demandis helpon.

La ensorĉo disiriĝis; iu estis en la monto; forgesinte ili la pasintan teruron glitiĝis sur la neĝo, altiritaj de tiu voĉo, kiu demandadis helpon, inter la blekoj de la lupoj, kiuj elflaris kaptajon por sagiti la malsaton.

Subite ili haltis. Sub iliaj piedoj krutaĵo baris la marŝadon, kaj tie, malsupre, ĉe angula vojo malklare lumigitaj de la luno, mortonta virino kuŝis kaj apud ŝi knabo, surgenua, singultploris: —Ho!, patrino, patrino, atendu la novan tagon por, ke iu venu, kiu helpos nin.

—Mi mortos... mi konas ĝin, mi bedaŭras tion por vi... aj!, kiu dirus al mi, kiam mi estis riĉa, ke mi mortos en tiu ĉi montaro kaj donos al mia filo, kiel sola heredaĵo... lunan nokton... kaj neĝan korpokovrilon.

—Ho, patrino, patrino!...

—Ludu... ludu, por fortimigi la lupojn kaj por farigi al mi la iluzio, ke mi revenis al tiuj feliĉaj tempoj.

—Sed...

—Ludu... ludu—ŝi diris, per korporema petego, kaj la knabo, duonfrenza, ludis la preludon de «Anillo de Hierro».

Ŝajnis, anstataŭ tiu pasia — «venu, Rodolfo». — Ke la violono, interpretante la dezirojn de tiu animo, diris: —«Venu, helpon, venu por Dio» — «jes, venu, ke mia patrino mortos pro malvarmo kaj mizero» — kaj tiuj «venu, venu», sonoritis tra la spaco tiel plende ke ĝi dolorigis.

La ĉasistoj malsupreniris; kurante, evitante la danĝeron kaj ĉirkaŭirante por eviti la krutaĵon, sen alia volo, krom tiu de la violono, kiu sonoritis, kvazaŭ la genio men de la muziko, ludus per arĉo.

Malmulte, tre malmulte mankis por ke alvenu ili, kiam la violono subite haltis, kaj ili aŭdis lastan krion, doloran krion, kiel de rompiĝanta koro...

Kiam li alvenis, la virino estis mortinta; kaj li, la inspirita muzikisto, kovris ŝin per sia korpo kaj per frenezaj okuloj rigardadis tiujn lupojn, kiuj alvenis al la flarado de la karno, kaj li batis la aeron per violono por forkurigi ilin...

III

Nun, en frenezulejo, oni povas vidi knabeton de lertaj okuloj, kiu havas manion ludi la violonon, kun tiom da inspiro, ke la gento nomis lin «la rava violono» kaj la malfeliĉulo diras, se oni demandas al li, kial li ludas: «ke lia patrino aŭdas lin de la ĉielo...»

El galica lingvo, tradukis,

E. BRUQUETAS.

◀ SCIIGOJ ▶

Nia bona amiko S-ro Vicente Perles, nacia instruisto de Aguarón, estro de la «Rondo de Esp. Naciaj Instruistoj» starigita de ni, kiu perfekte kaj entuziasme funkcias antaŭ unu jaro, ekskursis al Valencio kun 16 knaboj de lia lernejo. Ni tre kore gratulas nian viglan samideanon.

Nia bona kunsocietano S-ro Antonio Jiménez Mora el Oviedo, iris destinita en Ceuta—Juzgado Militar—kie li multe helpos nian movadon. Li tre kore dankas la ceuta' ajn samideanojn pro la bona akcepto kaj estimindaj servoj ricevataj el ili.

Nia antikva fratecano S-ro José Lerroux, ĉe oposicioj por la Mara Ministerio, atingis postenon, kaj estis destinita en la Sekretariejo de la Mara Bazo de Cartagena. Nian gratulon al la laborema samideano.

En Badalona aro da entuziasmaj esperantistoj fondis novan Esperantan Grupon «Badalona Esperantisto». La Direkta Komitato estas: Prezidanto, R. Teixidó; Vizprezidanto, M. Rodellar; Sekretario, J. Brió; Vizsekretario, J. Gatell; Kasisto, G. Vilalta; Kalkulisto, J. Batlle; Voĉdonantoj, R. Oncins kaj G. Ferrando. Socia ejo: Str Canonge Baranera, 7.

Ni kore gratulas ilin kaj deziras plenan sukceson en ilia laborado por disvastigo de Esperanto.

SPRITAĴOJ

S-ro Ministro vizitas eksperimentan kampon. Li alvenas al malgranda kvarangula peceto en kiu staras multe da verdaj kreskaĵoj ornamitaj per floroj.

—Ho! belega, kiom da floroj! (al inĝeniero direktoro): vi estas vera artisto; kiel vi amas la florojn!

—Pardonu, sinjoro Ministro, tio ĉi ne nur estas floroj, estas terpomoj.

—Ho! jes, jes... terpomoj... jes, sed, kie ili estas ke mi ne vidas tion?

Infano malkontenta ploras longe; lia patrino karesas lin, poste lin minacas... ŝi ne scias kion fari por ke li silentu; post longa tempo fine la ploranta haltigas sian ploron.

La patrino.—Dank' al Dio! Vi jam ĉesis plori.

La infano.—Ne, mi ne ĉesas; mi nur ripozas iomete, por daŭrigi.

P. BESCÓS.

PENSOJ

Tiuj ĉi pensoj, kiujn ni publikigas kaj tiuj, kiujn ni publikigos estis kolektitaj kaj tradukitaj de nia kara kunsocietano S-ro Vicente Inglada.

Vinberujo produktas tri specojn de beroj: unue, la plezuron; due, la ebriecon kaj trie, la penton.—*Anaĥarso*.

Diboĉulinoj deziras al siaj amantojn ĉiujn bonojn, escepte la prudenton kaj saĝecon.—*Antisteno*.

La rekompenco de mensogulo estas, ke oni al li ne kredas, se eĉ li diras veron.—*Aristotelo*.

Filozofio konsistas en tio: vidi en ĉiu objekto ĉion, kio enestas nenion pli, ol la enestajon.—*Balmes*.

Simpleco estas karaktero de vero.—*Boherarve*.

Parolu mallaŭde pri la virinoj, ĝenerale, kaj ĉiuj ili kontraŭstaros al vi; parolu mallaŭde pri iu aparta virino kaj ĉiuj ĥore konsentos.—*Bougeart*.

Lingvo estas ilo esence mova, maro submetita al senintermankaj alfluo kaj refluo, arbo, kiu senĉese renoviĝas kaj elburĝonas.—*Bouret*.